

5/2021

Septembro
Oktobroo

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Rezista malsupra Silezio
- ★ Mieczysław Bekker kaj luna revo
- ★ Asizo la urbo de ĉijara Itala Kongreso de E-to

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Adreso de redakcio

Robert Kamiński, ul. Kwiatowa 1/3
94-227 Łódź

Kunlaboro

Teresa Nemere, Andrzej Sochacki,
Magdalena Tatara, Adam Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2022 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 58 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 27 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.
Polan Esperantiston eblas aboni per
Konto de PEA en UEA: peaa-v;
Detaloj trovigas ce:
<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO
ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Stanisław Dobrowolski el Bjalistoko. Fotis R. Kamiński

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek- sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendadas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001
liberan monsumon priskribu
per vorto "Darowizna"



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Estraro informas	
<i>Ĉefa Estraro de PEA, Sekva Pola Esperanto-Kongreso en Łódź</i>	3
Eventoj	
<i>Roman Dobrzyński, Rezista Malsupra Silezio</i>	3
<i>Zbigniew Kornicki, „Foiro de Bono” en Poznań kun esperantistoj</i>	7
<i>Teresa Pomorska, Preĝtagoj en Częstochowa</i>	8
<i>Andrzej Sochacki, Kuranta Esperanto</i>	10
<i>Bjalistoka Esperanto-Societo, Nova serio da kursoj</i>	10
<i>Małgorzata Komarnicka, La programo EKO-Espero</i>	11
Mojose	
<i>Pola Esperanto-Junularo, Nova PEJ-estraro</i>	12
Raportoj, rakontoj	
<i>Jerzy Dryja, ASIZO (Assisi) – la urbo de la ĉi-jara Itala Kongreso de Esperanto</i>	13
<i>Magdalena Tatara, 18-a Chopin Konkurso en Varsovio</i>	16
<i>Jadwiga Greger, Iom pri Sopot</i>	18
Pri kio ni aŭdas	
<i>Robert Kamiński, „Honora mencio” en Belartaj Konkursoj por polo</i>	20
<i>Komunikoj de UEA Eks-prezidanto de UEA ricevis ŝtatan premion en Barato</i>	21
<i>Komunikoj de UEA En 2023 UEA kongresos en Torino, nordokcidenta Italio</i>	21
Vizitindaj lokoj	
<i>Barbara Pietrzak, Szczawno-Zdrój</i>	23
Homoj	
<i>Robert Kamiński, Mieczysław Bekker kaj luna revo</i>	25
<i>Varmia-Mazuria Societo de Esperantistoj, Andrzej Gielert</i>	27
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, Lokaj rolvortetoj. Antaŭ (kaj malantaŭ)</i>	28
Literaturaĵoj	
<i>Roman Dobrzyński, Parolantaj kapoj</i>	30
Saĝulaj pensoj	
<i>Anton Oberndorfer, Interreto plibonigas memorkapablon de pensiuloj</i>	32
Leterkesto	
<i>Jerzy Dryja, Ĉu vi scias?</i>	33
<i>Łukasz Bera, Retaj informoj pri la Esperantaj Preĝtagoj en Częstochowa</i>	33
<i>Adam Wilkus, Solvoj de la krucenigmoj en PE 1-4/2021</i>	34
<i>Paulina Jaworska, Ni renkontiĝu en Sopot</i>	34
Kalendaro de Esperanto-aranĝoj	35
Diverse, facile, bonguste	
<i>Teresa Nemere, Ĉina specialaĵo</i>	36
Forpasis	
<i>Andrzej Gielert</i>	37

El la fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki</i> , 12-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo 10-11.12.1994	38
Amuze	
<i>Adam Wilkus</i> , Krucenigmo pri bestoj	41
Zamenhof/Esperanto-Objektoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 5	43

Redaktoraj vortoj

Estimataj legantoj

Jen la kvina ĉijara numero de nia revuo. Ni volus eldoni la 6-an numeron en decembro, por fermi la eldonciklon en la kalendara jaro. Pola Esperantisto estas eldonita de dupersona redakcio kaj kelkaj helpantoj, kiuj sendas artikolojn kaj helpas en provlegado de la revuo. La nombro da legantoj ne estas alta. En 2021, proksimume 80 homoj abonas la paperan version de la PE kaj 16 homoj abonas la elektronikan version. Laŭ la ŝtata leĝo, PZE transdonas 16 ekzemplerojn al la plej grandaj bibliotekoj en Pollando. Ĉi tiuj estas ĉefe universitataj bibliotekoj, kie ĉiujn povas trovi PE en la sekcio de revuoj. Ni sendas revuojn ankaŭ al la aŭtoroj de tekstoj.

Bedaŭrinde, inflacio, altiĝantaj prezoj de presaj servoj kaj poŝtkostoj devigas nin iom plialtigi la abonprezon en 2022, por ke nia revuo ne alportu perdojn. La prezo altiĝos nur je 5 zlotoj. Nuntempe la eldonkvanto de la revuo estas 120 ekzempleroj, kio ebligas ĝin sendi al ĉiuj abonantoj, bibliotekoj, aŭtoroj kaj lasas kelkajn ekzemplerojn de la rezervo.

Ni bonkore petas vin instigi pli da homoj aboni la elektronikan version de Pola Esperantisto, ĉar tia abono pli efike subtenas la eldonbuĝeton. La redaktoroj klopodas diversigi temojn de artikoloj kaj ni esperas, ke tio alportas bonajn rezultojn, ĉar la nombro de abonantoj malrapide kreskas.

En la kvina numero, ni proksimiĝas al la fino de prezentado de la pola listo de objektoj rilatantaj al Zamenhof kaj la E-movado. La prezento de ĉi tiu listo ebligis ordigi kaj kontroli la staton de tiuj objektoj en Pollando.

En la lastaj monatoj, pro la mildigo de pandemio, okazis pluraj Esperanto-renkontiĝoj en nia lando. Ni invitas vin legi la rakonton de Roman Dobrzyński pri la Esperanto-Feriado en Łądek Zdrój kaj la raporton de Teresa Pomorska pri la 45 Esperantaj Preĝtagoj en Częstochowa. Rimarkindas la agado de esperantistoj en Poznań, kiuj aliĝis kun sia priesperanta programo al la publika aranĝo „Foiro de Bono”. En la venonta numero ni prezentos priskribon de Esperanto-renkontiĝo en Sopot kaj kristana kongreso en Legnica. Atentu pri interesaj artikoloj: estas la

raporto de Magdalena Tatara pri la finita monda Chopin-konkurso kaj la raporto de Jerzy Dryja pri Itala Esperanto-Kongreso en Asizo. En la venontaj numeroj ni planas prezenti la atingojn de la Esperanto-kulturo prezentante Esperanto-revuojn el diversaj landoj.

Ni kore invitas vin legi, kunkrei kaj aboni Polan Esperantiston en la sekva jaro.

Robert Kamiński

Ĉefa Estraro informas

Ĉefa Estraro de PEA

Sekva Pola Esperanto-Kongreso en Łódź

La Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio, dum sia kunveno la 24-an de oktobro 2021, akceptis rezolucion pri organizo de la 39-a Pola Esperanto-Kongreso en Łódź dum 23-26-a de junio 2022. La loko de la kongreso estos la Kulturdomo de Łódź, la str. Traugutta 18. La tranoktado por la kongresanoj estas planata en la PTSM-Tranoktejo ĉe la str. Zamenhofa 13.

Eventoj

Roman Dobrzyński

Rezista Malsupra Silezio

La pandemio ne sukcesis venki Malsupran Silezion. Ĝia fama Internacia Esperanta Feriado ne cedis al la kronviruso kaj ripetiĝis en la jaroj 2019, 2020 kaj 2021, ĉiam dum la naŭ unuaj tagoj de septembro. Ĉi-jare ĝi okazis jam la 54-an fojon kaj meritas ne nur la titolon de la **tradicia**, sed ankaŭ la **plej longdaŭra** Esperanta aranĝo de la pola Esperantujo. Ĉi-jare la epiteto „internacia” ne konfirmiĝis, ĉar feriiis ekskluzive gepoloj. Sed tiu ĉi fakto havis ankaŭ sian avantaĝon, ĉar ne necesis ripeti dulingve organizajn informojn kaj la duono da la ferianoj estis tute „virgaj” ĉeestantoj, alivorte ne eternaj komencantoj, sed novuloj, avide lernantaj Esperanton. Teresa Pomorska perfekte aplikis la „ĉe-metodon” kaj subtenis sian instruadon per la televida kursfilmo „Mazi en Gondolando”. Mi, kiel la aŭtoro de ĝia Esperanta versio, kun ĝojo spektis ĝin kune kun la lernantoj, kiuj entuziasme kaj ridante sorbis ĝian enhavon.



Teresa, la prezidantino de la Silezia Asocio de Esperanto kun la sidejo en Wrocław, plenumis la organizon kun la helpo de Georgo Stefański. La IEF-oj okazadis dum sia longa historio en diversaj lokoj, sed ekde kvar jaroj estas Łądek-Zdrój, kiu gastigas esperantistojn. Tiu ĉi sepjarcenta kuracejo estas ĉirkaŭita de Oraj Montoj, kio verŝajne motivigas ĝian germanan nomon Bad Landeck, kio signifas „landangulo”. Post la jaro 1945 ĝi estis lerte poligita kiel Łądek-Zdrój. La nomo de la montoj rememorigas minejojn de oro, al kiu la urbo ŝuldis sian prosperon, precipe dum la 16-a kaj la 18-a jarcentoj. Konfirmas tion ĝia renesanca kaj baroka arkitekturo. Teresa ĉiutage gvidis la feriantojn tra montaj arbaroj kaj vizitis iliajn mirindaĵojn.

Ŝi sukcesis plene profituzi la vilaon „Apis”, ĉar en ĝi loĝis nur esperantistoj. Tio ebligis realigi la ferian programon ekde la frumateno ĝis la profunda nokto. Tagoj komenciĝis per la gimnastiko, gvidata de Aneta Wacowska, kiu rapide progresis en Esperanto. Abundaj kaj bongustaj matenmanĝoj daŭris unu horon, ekde la 8:30. La tempon ĝis tagmanĝoj plenigis okupoj pri Esperanto. Krom la jam menciita baza kurso okazis la supera kurso, kiu realiĝis per la kurioza instrumentado. Tuj post la matenmanĝo kolektiĝis dudekpersona grupo sur la vasta teraso. Tie aŭdeblis komuna legado de la noveldonita libro „Verda Simio”. Ĝi konsistas el humoraĵoj, verkitaĵoj de mi antaŭ sesdek jaroj, por la studenta kabaredo kun la sama nomo. Ĉiu ĉeestanto legis po unu alineo, kiu tuj estis tradukata en la polan lingvon kaj poste parkere ripetata Esperante. Oni lernis,

diskutis kaj ridis. Kelkaj personoj surprizis per sia bonega kono de la internacia lingvo, ekzemple Wojtek Ławnikowicz. Li aŭskultis frazon aŭ eĉ la tutan alineon, tradukis ĝin en la polan lingvon kaj, parkere, ripetis ĝin en Esperanto.



Li estas eksterordinara persono, denaske blinda, profesia muzikisto kaj kantisto. Wojtek majstre ludas gitaron kaj pianon, li baritone kantas centojn da kanzonoj kaj arioj, konante parkere iliajn tesktojn. Li multe kontribuis al la arta programo de la feriado, kiun inspiradis Halina Różanek el Szczecin. Ŝi lerte ludas akordionon kaj bele kantas. Ŝi, helpata de Wojtek kaj Georgo, gvidis ĉiutage la kantadon, okazantan post la vespermanĝo. IEF-oj famas pro sia kantemo, sed ĉi-foje oni rezignis de la rutine ripetataj kantoj, kaj lernis tute novajn, uzante freŝe eldonitan kantanon. Kompilis ĝin Ewa Tracz, Teresa Pomorska, Halina Różanek kaj Bogdan Dembiec.



Esperantistaj ferianoj plurfoje kantis for de sia „Apis, en la centro de la kuracejo, apud la mirinda pavilono „Wojciech” (Adalberto). Ĉe tiu centra trinkejo kaj naĝejo de sanigaj akvoj amase kolektiĝas kuracatoj kaj turistoj. Ĝi do estas bonega loko, por propagandi la Zamehoflingvon. En la apuda, barokstila preĝejo, okazis katolikaj mesoj, celebrataj en Esperanto fare de la pastro Roman Gmyrek, la anim-zorganto de polaj esperantistoj. Danke al la pastro la preĝejo servis krome kiel publika koncertejo, en kiu okazis altnivela recitalo de Wojtek Ławnikowicz. La urba kultur-



domo estis ankaŭ malfermita por esperantistoj. Tie okazis recitalo de la germana profesia kantisto Karsten Schnathorst, invitita de la urbestro de Łądek-Zdrój. Li koncertis por la ĝenerala publiko en Esperanto kaj en la pola lingvo kaj estis arde aplaŭdata. Lian reĉitalon gvidis Halina Kuropatnicka, la elstara poetino, verkanta pollingve kaj Esperante. Karstenon oni konas en Esperantujo kiel Kaŝi. Li estas blinda. Kiam finiĝis aplaŭdoj, mi volis prezenti min al li. Apenaŭ mi diris: *Kaŝi*, li tuj reagis: *Saluton Roman*. Nekredeble! Mi renkontiĝis kun li nur unufoje, antaŭ kelkaj jaroj, en la Hamburga Esperanta Klubo.

La feriado de Malsupra Silezio diferencas de tiuj Esperantaj aranĝoj, kies programo konsistas el du elementoj: unu prelegas, la aliaj mute aŭskultas. En Łądek-Zdrój kreiĝis la etoso de aktiva partopreno, ĝi ebligis al ĉiu ĉeestanto eksponi senĝene siajn „kvin minutojn”, ekzemple Świątosław Fortuna el Kalisz evidentiĝis bona pianisto, Halina Różanek montriĝis ne nur akordionistino, sed ankaŭ aŭtorino de amuzaj versoj pri ĉiutagaj okazintaĵoj. Aleksander Zdechlik faris la samon proze. Nu, li reprezentis Supran Silezion kaj kun la alia samlandano, Stanisław Mandrak organizis junie en Mielno-Unieście la similprograman Esperantan Baltan Printempon. Jen la konkludo: ambaŭ Silezioj sukcese rezistis la pandemion.

„Fairo de Bono” en Poznań kun esperantistoj

La 19-an de septembro 2021, dum la „Fairo de Bono” en Malnova Zoo en Poznań, oni povis partopreni Esperantan programon. En la foira zono „Kulturo”, dum horoj 12-17, lokaj esperantistoj gvidis informstandon. Je la 13:00 okazis Esperanta koncerto de Zuzanna Kornicka kun gitara akompano kaj je la 13:30 prof. UAM dino hab. Ilona Koutny prelegis pri la temo: „Serĉante nuntempan internacian lingvon: Esperanto kiel alternativo”. Post la prelego, Zuzanna Kornicka kaj Zbigniew Kornicki gvidis Esperanto-laborejojn por komencantoj.



Preĝtagoj en Częstochowa

Ŝajne iel mirakle por partopreni en la 45-aj Esperantaj Preĝtagoj, dum 8-10.10.2021, alvenis 45 personoj. Ni komencis la renkontiĝon de vizito en la bazlernejo n-ro 38, kiu portas nomon de Ludoviko Zamehof.

Lernantoj de la lernejo, en sia raporto, bele skribis: “La lingvo Esperanto vivas. La ideo de Ludoviko Zamenhof, patrono de nia lernejo, ŝajnas plu unuigi homojn, sendepende de la aĝo, konfeso kaj vidpunkto. Dum la vizito, gastoj havis la eblecon spekti prezentaĵon preparitan de la lerneja teatra rondo kaj reciprokis per la komuna kantado kaj dancado. La pastro Roman Gmyrek donacis al nia biblioteko librojn, novtradukitaj en Esperanton. Tamen, la plej grava estis tio, ke malgraŭ generacia diferenco, ni povis observi kiel dum la renkontiĝo foriĝas la limoj inter homoj: maljunuloj interparolas kaj diskutas kun niaj gelernantoj, dividas siajn spertojn kaj travivaĵojn kaj kun intereso aŭskultas elparolojn de la junularo. Tiu renkontiĝo longe restos en niaj koroj. Elkore ni dankas pro la vizito kaj invitas denove. La pordo de nia lernejo ĉiam estas por vi malfermita”.



Pri tiu ĉi renkontiĝo aperis raporto kun fotoj sur la lerneja hejmpaĝo <https://sp38.czest.pl/bonan-matenon-dzien-dobry/>.

Ankaŭ larĝe malfermita estis por ni la pordo de la paroĥejo de nia pastro Roman en Częstochowa. Tie ni denove estis akceptitaj kun frandaĵoj: pano kun hejme preparita ŝmalco kaj acidaj kukumoj kaj bongustaj kukoj. Kompreneble, ni meritis tiun regaladon, ĉar ni prezentis Esperanton en la

preĝejo dum la esperantlingva sankta meso, dum rozario kun parohanoj kaj ankaŭ okazis koncerto de Wojtek Ławnikowicz, kiu kantis parte esperantlingve, akompanante sin per gitaro kaj organo. Enhavoriĉan tagon ni finis per la nokta promeno tra la urbo, kie, sur Malnova Urboplaco, ni admiris modernajn skulptaĵojn.



La dimanĉa mateno komenciĝis per la solena sankta meso en Helmona Kapelo. Poste ni vizitis Primasan Instituton, kie ni povis aŭskulti rememorojn de sinjorino Maria Okońska, kiu sian tutan vivon dediĉis al laboro por la primaso kardinalo Stefan Wyszyński. En la Instituto estas kolektitaj diversaj objektoj ligitaj kun li, kaj riĉa, predika heredaĵo, kiun la Instituto nun prilaboras. En la jaro de beatigo de Stefan Wyszyński, tiu vizito havis speciale valoran signifon.

Posttagmeze estis la ebleco viziti alian interesan lokon en Częstochowa. En tiel nomata Valo de Mizerikordo, kie havas sian sidejon pastroj Pallotinanoj, lastatempe oni finis konstrui kaj ornami novan preĝejon. Ĝi estas eksterordinare bela kaj nepre vizitinda. Ne ĉiuj samideanoj vidis ĝin, do estas bona celo, por la sekvontjara vizito en Częstochowa.



Kuranta Esperanto

La 24-an de septembro 2021, ĉirkaŭ 4000 partoprenantoj kaj pli ol 900 kvarpersonaj teamoj, en la tuta lando, partoprenis la 5-an kuron „Erasmus Plus”, kies celo estas unu: kuri, ie ajn, entute la plej longan distancon en 60 minutoj. Ĉi-jare la Nacia Agentejo Erasmus Plus vastigas la formulon por inkluzivi la eblecon ekigi unuopajn homojn, kiuj hazarde kombiniĝos en stafetkurojn kun aliaj unuopaj kurantoj.

La kvinan fojon en la tutlanda kuro partoprenis studentoj, instruistoj kaj ĉiuj amikoj de sporto. Ne gravis kie vi loĝas kaj kie vi lernas. Gravis tiuj, kiuj volis venki siajn proprajn limojn aŭ nur amuziĝi. Ĉi-jare en Staszów mi organizis la kvarpersonan teamon „ESPERANTO”. En nia teamo, krom mi, kuris: Artur Banaś, Kazimierz Okoński kaj Rafał Jastrząb.

Mi kore invitas vin partopreni en la venontjara kuro. Vi kreu kvarpersonan teamon aŭ kuru unuope.

Informoj pri la Erasmus-Kuro vi povas rigardi en: <https://erasmusplus.org.pl/bieg-erasmusa> kaj fanpaĝo fb.com/BiegErasmusa.

The screenshot shows a mobile application interface for a running event. On the left, there are navigation buttons for 'Bieg Erasmusa 2021', 'PROFIL KURANTO', and 'WIELKI ERASMUS 2021'. The main area displays the runner's name 'Andrzej Sochacki' and their bib number '457/1'. Below this, it shows the team name 'Esperanto'. To the right, a 'TEAM:' section contains a table with the following data:

No/Rib	Nazivokurante
457/1	Sochacki Andrzej
457/2	Okoński Kazimierz
457/3	Banaś Artur
457/4	Jastrząb Rafał

At the bottom of the team table, it says 'Miejscze | Position: 57 DYSTANS | DISTANCE: 6.13 KM'.

Bjalistoka Esperanto-Societo

Nova serio da kursoj

La Bjalistoka Esperanto-Societo komencas novan serion da kursoj de la internacia lingvo! Lunde la 18-an de oktobro 2021, je 17.30 en BES-sidejo ĉe la str. Piękna 3 okazis la unua malferma kunveno por Esperanto-komenca kurso, okazonta ĉiu semajne. La senpaga kurso, gvidata de Iwona Kondraciuk, daŭros 5 monatojn.

Cetere ĉiumerkrede, je la 17.00, ni invitas al la kurso de Nina Pietuchowska por tiuj, kiuj daŭrigas sian lernadon, kaj jaŭde, je 17.00, al la konversacia klubo, gvidata de Jeanne Grimaud.

La programo EKO-Espero


Kiam mi komencis skribi artikolojn pri ekologio, mi ankaŭ komencis serĉi la eblecon prepari similtematajn programojn por vasta publiko. Tial, kiam mi nur rimarkis, ke la Oficejo de Marŝalo de Malsupra Silezio organizas konkurson por tiuj, kiuj promocias ekologiajn agadojn, mi tuj preparis projekton kaj sukcese partoprenis en la konkurso. Mi kreis EKO-Grupon, kies gvidantino fariĝis

mia amikino, Joanna Kwiatkowska kaj nomis la projekton: EKO-Espero Realigo de la programo daŭris du monatojn - julie kaj aŭguste kaj okazis en la sidejo de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

La ĉefa celo de la programo estis vekti ekologian konscion de la partoprenantoj, ellerni mallarĝigi ligilojn kun la naturo kaj krei respondecan sintenon por la nuna kaj estonta mondo. La renkontiĝoj estis la okazoj dividi spertojn kaj proponojn, esplori gravajn temojn, diskuti kaj ankaŭ agrable pasigi tempon.

La kerno de la programo estis prelegoj kaj diskutoj pri ekologio kaj aldone estis ankaŭ kulinara laborsekcio, gimnastiko kaj recikligo.

Dum prelegoj, kiujn mi prezentis, mi parolis pri ekologio kaj strebis konvinki aŭskultantojn, kial kaj kiel, oni devas enkonduki ekologiajn ŝanĝojn en sia vivo. Kiel ekzemplon kaj argumenton, ke oni povas vivi feliĉe, estimante la naturon, mi prezentis miajn proprajn impresojn kaj ankaŭ filmon pri la farmbieno „Bona Espero”, gvidata de esperantistoj en Brazilo. Tie oni produktas necesajn legomojn kaj fruktojn estimante la naturon, ne uzante kemiaĵojn kaj atingas memsufiĉon en mastrumado. Ĉeokaze tio estis la ebleco informi iom pri Esperanto kaj agado de esperantistoj.



La kulinaraĵajn laborsesiojn gvidis Irena Solarek, kiu pruvis, ke ni povas prepari bongustajn manĝaĵojn, uzante ĉiujn manĝeblajn partojn de legomoj laŭ la principo „senrubeco”.

Dum nia programo ni proponis ankaŭ korpekzercojn, kiuj influas pozitive korpon kaj animon. La serion da simplaj korpekzercoj, speciale por nia programo, preparis kaj gvidis Teresa Tadeuszyk.

Realigante la projekton ni klopodis ankaŭ konsciigi, kiel grava estas recikligo, ke ĝi estas bona manterapio. Praktikaj ekzercoj, gvidataj de Renata Gladyszewicz, montris, kiel facile estas doni duan vivon al diversaj aĵoj, ekzemple al vitraj bokaletoj de jogurto, kiuj en ŝiaj manoj transformiĝis al belaj kandelingoj kaj florpotetoj.

Fine de la programo estis preparita kaj eldonita dulingva broŝuro (en la pola kaj en Esperanto). En la broŝuro troviĝas parto de la prezentita ekologia programo, por helpi al partoprenantoj firmigi akiritajn informojn. En ĝi troviĝas ankaŭ elektitaj receptoj, priskribo de korpekzercoj kaj klarigo, kiamaniere fari „recikligan” kandelingon.

Ĉeokaze mi kore dankas al Robert Kamiński, kiu preparis broŝuron por presejo.

Mi aldonas, ke en nia programo partoprenis pli da personoj ol ni planis. Tio signifas, ke programoj pri ekologio estas bezonataj. Akompanis nin vigla diskuto kaj specifa etoso. Sub ĝia influo Joanna Kwiatkowska pentris belegan pentraĵon. Dum realigado de la programo ni ĉiuj multe lernis kaj ni dividis niajn spertojn.



Mojose

Pola Esperanto-Junularo

Nova PEJ-estraro

Ekde la 10-a ĝis la 12-a de septembro 2021 en Triurbo (pli precize, en Gdańsk kaj Sopot) okazis la ĉi-jara Kunveno de PEJ. Same kiel lastjare, ĝi estis prokrastita pro la epidemia situacio. Ni tamen tre ĝojas, ke ĝi povis okazi, kun 11 partoprenantoj de la kunveno kaj aldonaj dek kelkaj partoprenantoj de la kune okazanta tradicia triurba evento *Esperanto sur la strando*.

Kadre de la Kunveno oni eletis la novan estraron de PEJ. Same kiel pasintjare, membras en ĝi kvin personoj:

- Rafał Darasz – prezidanto
- Kamil Getka – vicprezidanto
- Paweł Wójtowicz – kasisto
- Tobiasz Kubisiowski – sekretario
- Romualda Jeziorowska – estrarano

Ni kore bonvenigas novan estraranon Rafał, kiu ekde nun prezidos nian organizaĵon. Samtempe ni ŝatus tre varme danki nian kolegon Piotr Hołda, kiu dum kelkaj jaroj estis nia kasisto. La nuna estraro oficos ĝis la sekva kunveno de PEJ, kiu devus okazi en printempo 2022.



De maldekstre: Rafał Darasz, Romualda Jeziorowska, Tobiasz Kubisiowski, Paweł Wójtowicz

Raportoj, rakontoj

Jerzy Dryja

ASIZO (Assisi) – la urbo de la ĉi-jara Itala Kongreso de Esperanto

Prokrastita je unu jaro, pro la kronvira pandemio, la 88-a Itala Kongreso de Esperanto okazis ĉi-jare aŭguste en la prestiĝa, konata historia loko – Asizo (itale: Assisi), en la regiono Umbrio de la centra parto de Italio.

Asizo situas 200 kilometrojn norde de Romo, meze de Umbrio, 25 kilometrojn de la regiona ĉefurbo Peruĝo, sur la mezdeklivo de la monto Subasio, 424 metrojn super la marnivelo. Ĝi estas turisma centro eksterordinare interesa, unu el la plej belaj urboj de Italio. Tiujn, kiuj alvenas tien el ĉiuj mondopartoj, allogas la arttrezoroj kaj la franciskanaj memoraĵoj.

Asizo estas, post Romo, la plej grava katolika pilgrimejo en Italio. Asizo estas la plej konata kiel naskiĝloko de sankta Francisko kaj sankta Klara. Tie estis fonditaj katolikaj monaĥaj ordenoj de la franciskanoj kaj de la klaraninoj. La Baziliko al Sankta Francisko kun la pliaj bazilikoj kaj urbaj valoraĵoj estas enskribitaj en la liston de la monda kulturheredaĵo de UNESKO.



Sankta Francisko el Asizo (1181- aŭ 1182-1226), estas unu el la plej famaj kristanaj sanktuloj kaj la fondinto de la religia ordeno de franciskanoj, unu el la ĉefaj ordenoj de katolikismo. La kardinalo Jorge Mario Bergoglio, elektita papo en 2013, estas la unua papo kun la pontifika nomo Francisko. Sankta Francisko estis proklamita ĉefa patrono de Italio, kune kun sankta Katerina el Sieno, en 1939. Sankta Francisko estas konata kiel “ malriĉulo el Asizo”. Li havas gravan rolon ankaŭ en la historio de la mezepoka itala literaturo, pro sia poemo “La kantiko de la kreitaĵoj”, la plej antikva versaĵo de la itala literaturo. En Esperanton tradukis ĝin Kálmán Kalocsay. Atributoj de la sankta Francisko estas froko, stigmatoj, kranio de mortinto, lupo, birdoj.

Sankta Klara el Asizo (1194–1253), estis religiulino, kunlaborantino de sankta Francisko el Asizo kaj labfondintino de la monaĥinoj klaraninoj. Fascinite de la predikado kaj ekzemplo de Francisko, Klara volis krei familion de klostroloĝantinoj tute malriĉaj, tute dediĉintaj al preĝo. Ili estos por ĉiam konataj kiel klaraninoj. Sankta Klara estis dekretita patronino de la radio, televido, telekomunikado, pentristoj.





Ĉi-jare realiĝis la revo de la italaj gekolegoj. Ili okazigis reale sian tradician Esperanto-kongreson, respektante regulojn de sansekureco, pro la pandemio de KOVIM-19. Venis 162 partoprenantoj el 14 landoj de Eŭropo kaj de Nord-Ameriko. La kongresejo estis aranĝita en la la 4-stela hotelo, kongrescentro “il Cenacolo”. Regis la itala varma, suna vetero. La Landa Kongresa Komitato, gvidata de Michela Lipari kun helpo de kunlaborantoj, preparis interesan, abundan programon, enhavantan sciencajn, lingvajn, kulturajn kaj ekskursajn erojn. Dum la oficiala inaŭguro de la kongreso, parolis la urbestro de Asizo kaj prelegis prof. Duncan Charters, la prezidanto de UEA, kiu sekve gvidis kvartagan seminarion pri “Komunikado: interpersona, informa, transkultura, konfliktoŝolva”. Siavice prof. Renato Corsetti gvidis plurtagan seminarion kun la temo “Sankta Francisko kaj la lupoj: paco kaj milito en la nuna mondo”. Okazis dek prelegoj, lingvo-kursoj baza, progresiga kaj pri Esperanta literaturo, gvidita de Anna Lowenstein. Okazis ankaŭ lingvaj ekzamenoj. Estis realigitaj pluraj busekskursoj tra la tuta regiono de Umbrio. Kongresajn vesperojn plezurigis koncertoj kaj rakontmonologoj dediĉitaj al la vivhistorio de L. Zamenhof. Okazis libroprezentado kaj funkciis libroservo de Itala Esperanto-Federacio. Estis celebrataj katolikaj diservoj en Esperanto.

Mi tre ĝuis la partoprenon en la 88-a Itala Kongreso de Esperanto. Ĝi estis altnivela, profesie organizita, dum ĝi regis amika etoso. La organizantoj de la kongreso meritas gratulon. La italaj gekolegoj jam nun invitas al sia venontjara, 89-a landa kongreso, okazonta aŭguste en Breŝo (Brescia), en la norda regiono de Lombardio.



18-a Chopin Konkurso en Varsovio



En Varsovio, ekde la 2-a ĝis la 23-a de oktobro 2021, okazis la 18-a Chopin Konkurso. Tio estas unu el la plej malnovaj (la unua konkurso okazis en la jaro 1927) kaj prestiĝaj piankonkursoj en la mondo kaj unu el malmultaj konkursoj dediĉita al la verko de unusola komponisto.

La organizanto de la 18-a Konkurso estis la Nacia Fryderyk Chopin-Instituto. La nacian patronecon prenis la prezidento de Pola Respubliko kaj la ĉefa kunfinancanto de la evento estis Ministerio pri Kulturo, Nacia Heredaĵo kaj Sporto. Aliaj sponsoroj de la premioj estis pola parlamento kaj la prezidento de la pola ĉefurbo Varsovio.

La ĉi-jara muzikevento estis prokrastita je unu jaro, kaŭze de la pandemio de Kovim-19. Feliĉe, la publiko rajtis partopreni konkursajn koncertojn. Al la konkurso anoncis sin pli ol 500 junaj pianistoj el la tua mondo, sendante DVD-diskojn kun siaj prezentadoj. La organizanto invitis 151 personojn al la kvalifika prezentado, kiu okazis ĉi-julie en Varsovio. Post tiu provo, al la ĉefa konkurso estis akceptitaj 78 pianistoj kaj plie 9 personoj, kiuj rajtis partopreni en la konkurso sen kvalifiko, estante premiitoj de kelkaj aliaj piankonkursoj. En la unua etapo partoprenis 22 ĉinoj, 16 poloj, 14 japanoj, 7 koreoj, 6 italoj kaj ankaŭ reprezentantoj de Armenio, Kubo, Kanado, Rusio, Usono, Slovenio, Latvio, Hispanio, Tajvano, Hongkongo, Tajlando, Britujo kaj Vjetnamo – entute partoprenantoj el 18 landoj. Laŭ la regularno, en la konkurso rajtis partopreni muzikistoj de 16- ĝis 30-jaraj.

La konkurso estis dividita je kvar etapoj, dum kiuj partoprenantoj devis ludi sen notoj elektitajn verkojn de Fryderyk Chopin. En la unua etapo prezentado de ĉiu pianisto daŭris ĉirkaŭ 20 minutojn kaj ĉiu konkursano devis ludi du etudojn, baladon aŭ barkarolon, skercon kaj nokturnon. Dum la dua etapo prezentiĝis 45 personoj, ĉiu dum 30-40 minutoj. Ili devige ludis valson kaj polonezon kaj devis prezenti unu alian verkon, elektante inter balado, barkarolo, skerco, fantazio. Al la tria etapo ĵurio akceptis 23 pianistojn, kiuj prezentis devige sonaton aŭ preludojn kaj mazurkojn. Fine, la kvaran, finalan etapon partoprenis 12 pianistoj, kiuj ludis kun orkestro de Varsovia Filharmonio unu el du piankonĉertojn de Chopin. La pianistoj estis pritaksitaj de 17-persona, internacia ĵurio, gvidata de profesorino Katarzyna Popowa-Zydroń. En laboro de la ĵurio partoprenis elstaraj piala nistoj kaj pedagogoj el Pollando, Usono, Rusio, Japanio, Ĉinio, Brazilo, Francio, Argentino, Latvio kaj Vjetnamo, inter ili estis venkintoj kaj premiitoj de pli fruaj Chopin-konkursoj.



Laŭ la opinio de membroj de la konkursa ĵurio, ekspertoj, ĵurnalistoj kaj muzikamantoj, la nivelo de la ĉi-jara konkurso estis ege alta kaj la partoprenantoj estis bonege preparitaj.

Bruce (Xiaoyu) Liu el Kanado

La konkurson venkis reprezentanto el Kanado Bruce (Xiaoyu) Liu, kiu estas la unua kanadano, kiu

gajnis la prestiĝan, unuan premion.

La ailaj premiitoj estas jenaj:

2-a premio *ex aequo* - Alexander Gadjiev - Italio/Slovenio kaj Kyohei Sorita - Japanio

3-a premio - Martin Garcia Garcia - Hispanio

4-a premio *ex aequo* - Aimi Kobayashi - Japanio kaj Jakub Kuszlik - Pollando

5-a premio - Leonora Armellini - Italio

6-a premio - J. J. Jun Li Bui - Kanado

Specialan premiojn ricevis: La premion de Pola Radio por la plej bona prezentato de mazurkoj – Jakub Kuszlik el Pollando

Premio de Nacia Filharmonio por la plej bona prezentado de konĉerto - Martin Garcia Garcia el Hispanio, la premio de Krystian Zimerman por la plej bona prezentado de sonato - Alexander Gadjiev el Italio/Slovenio.

La ĵurio ne aljuĝis la specialan premion de la Societo de Fryderyk Chopin por la plej bona prezentado de polonezo.

La aliaj finalistoj de la 18-a Chopin-Konkurso: Eva Gevorgyan el Rusio/Armenio, Hyuk Lee el Sud-Koreio, Kamil Pacholec el Pollando kaj Hao Rao el Ĉinio, ricevis egalajn distingojn.

La konkurso povis esti spektita en la plej malproksimaj anguloj de la mondo. Ĉiuj konkursaj prezentadoj estis elsendataj de la Pola Televido - TVP Kultura kaj la dua programo de Pola Radio. Plie, la internacia komunumo de muzikamantoj plej ofte sekvis la prezentadojn ĉe la Jutubo-kanalo de Fryderyk Chopin-Instituto. La elsendoj plej ofte estis spektataj en Japanio, Korea Respubliko, Pollando kaj Usono. La elsendoj de Chopin Konkurso ankaŭ haveblis en la poŝtelefona apo *Chopin Competition*. Eblis ankaŭ sekvi la muzikan turniron per la oficiala retejo de la konkurso : <https://chopin2020.pl/pl>. La Konkurson observis ankaŭ multaj sociaj retoj: Facebook, Instagram, Twitter, TikTok kaj Ĉina Weibo, kiu altiris rekordan

nombron de spektantoj. La informoj, rilatanta al la evento, estis publikigita en 6 lingvoj.

Dum la 15 tagoj de prezentadoj de la 18-a Chopin-Konkurso, la pianistoj prezentis entute preskaŭ 2000 interpretadojn de verkoj de Fryderyk Chopin. Se ĉiu tiu materialo estus prezentita dum unu recitalo, ĝi devus daŭri preskaŭ 100 horojn senĉese. Ni ĝoju, ke eĉ dum pandemia tempo ni havis okazon aŭskulti piankonkurson de tiu alta rango.



Komuna foto - premiitaj pianistoj, membroj de ĵurio kaj sponsoroj de premioj.
Foto: PAP/Albert Zawada

Jadwiga Greger

Iom pri Sopot

Ĉi-jare Sopot festas la 120-an datrevenon de ricevo de la urbaj rajtoj. Triurba Esperantista Asocio "Torento" partoprenas en la urba festado per la fotoekspozicioc "Spuroj de vilaĝo en la nuna urbo". Tiujn spurojn ni trovis sen problemoj en la granda, malnova ĝardeno de la gefratoj Edyta kaj Harry Spirowski, la plej maljunaj geesperantistoj en Sopot.

Mallonga historio de la iama, klostra vilaĝo SOPOT

La nomo Sopot aperis en la jaro 1283. Tiam, per la dekreto de la duko de Gdańsk - Mściwoj la 2-a, la vilaĝo estis transdonita al la cistercianoj de Oliwa. Ili posedis Sopot dum preskaŭ 500 jaroj. La preĝejo posedaĵo estis prenita de la prusa ŝtato, post la Unua Dispartigo de Pollando.

Sopot komencis transformiĝi de vilaĝo al somera feriejo meze de la 16-a jarcento. La cistercianoj luis allogan teron al la plej riĉaj komercistoj el Gdańsk, kiuj komencis konstrui tie somerajn domegojn kun imponaj ĝardenoj. Ili estis kreitaj ĉefe en la ĉirkaŭaĵo de la hodiaŭaj stratoj 1 Maja kaj Bohaterów Monte Cassino.

Kurioze, la malsupra teraso restis neloĝata, ĝis la komenco de la 19-a jarcento.

La jaroj 1733-1734 estis tragike markitaj en la historio de Sopot. La urbon tute forbruligis la rusa armeo. La rusoj, sieĝantaj Gdańsk, bruligis la marbordajn setlejojn, ĉar ili ne povis kapti Stanisław Leszczyński, kiu tiam militis kontraŭ Aŭgusto la 3-a. Rezulte de la krimfajro, la kortegoj en Sopot estis forlasitaj de Gdańsk-patricioj kaj neniu loĝis en ili, ĝis la mezo de la 18-a jarcento. Tiam la plej multaj el ili estis aĉetitaj de magnatoj de la familio Przebendowski. Antaŭ la 19-a jarcento ili jam posedis 11 el 15 grandbienoj de Sopot.

Post la dispartigo de Pollando, plimulte da bienoj de la vilaĝo estis venditaj la komercisto Carl Christoph Wegner el Gdańsk.

La unua vera Bancernto estis konstruita en 1823 de la d-ro Jean Georg Haffner. Ĉi tiu evento estas konsiderata kiel la simbola dato de la starigo de la feriejo Sopot. Tiam disvolviĝo venis rapide. Jaron poste, estis aranĝita la Kuracdomo, unua ligna moleo, 63 m longa, kaj la SPA-Parko.

Sopot ricevis urbajn rajtojn la 8-an de oktobro 1901 per edikto de la germana imperiestro Vilhelmo la 2-a. Antaŭ la unua mondmilito, Sopot havis 17,4 mil loĝantojn kaj post la unua mondmilito, en 1920, kiam la Libera Urbo Gdańsk estis establita laŭ la Traktato de Versajlo, Sopot estis enigita en ĝian regionon.

Estas interese, ke rapide ekaperis en Sopot esperantistoj, ke aktivado de la lokaj esperantistoj estas rimarkebla ankaŭ nuntempe.

Ni ekkonas la historion de la Esperanto-movado en la urbo Sopot danke al la kronikaj fascinoj de Józef Golec. El lia libro „Gdański esperancki ruch 1907-2007” oni ekscias, ke en 1927, antaŭ la 19-a Universala Kongreso de Esperantistoj en Gdańsk, organiziĝis en Sopot "Loka Esperanto-Grupo Zoppot".



Ĝia prezidanto fariĝis Kurt Perling. Dum la kongreso, en la periferio de la urbo, festante la 40 jariĝon de Esperanto, oni plantis la Jubilean Kverkon kaj apude starigis ankaŭ memorŝtonon. Tiamaniere kreĝis “arbarherbejo de esperantistoj”. La riĉa historio de tiu loko kaj aliaj 4 ZEO-oj en Sopot atestas pri aktiveco de la lokaj esperantistoj.

Post la dua mondmilito, en la urbo funkciis la loka filio de PEA, la Klubo de Instruistoj-Esperantistoj, prof. Toczyski gvidis somerajn Espeanto-kursojn por instruistoj, Józef Golec fondis la Esperanto-Muzeon en sia lernejo n-ro 8, ekzistis la Esperanto-Skolta Teamo, Esperanto estis instruata en bazlernejoj ktp. Nuntempe en Sopot, ekde 10 jaroj, aktivas “Torento”-Asocio de Esperantistoj de la TriUrbo. Sian nomon ĝi heredis post pli frue funkcia Rondo “Torento” de PEA. Meritas substreki, ke esperantistoj en Sopot kunlaboris kaj daŭre kunlaboras kun la urbo, alligante al la organizado de diversaj programoj de la urbo kaj partoprenante, laŭ siaj eblecoj, en diversaj urbaj festoj. Ni ĝojas, ke ni povis aliĝi al la festado de la 120- jariĝo de la urbo.

Pri kio ni aŭdas

Robert Kamiński

„Honora mencio” en Belartaj Konkursoj por polo

La 19-an de septembro la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK) diskonigis la rezultojn de la ĉi-jara 72-a konkurso dum la premifesto elsendita pere de la kanalo de UEA ĉe YouTube, UEAviva. La BK-feston kungvidis Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) kaj Miguel Fernández, respektive Sekretario kaj Prezidanto de la Belartaj Konkursoj. En la BK partoprenis absolute rekorda nombro de **186 verkoj** el la 5 kontinentoj.

Ni ĝojas, ke nia samideano ricevis honoran mencion. en la branĉo eseo. **Honora mencio estas aljuĝita** al Roman Dobrzyński el Pollando pro “Tridek malmortoj de Danielo”.

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021 respektoblas en UEAviva: youtu.be/NE1Ye1eh6o4.



Eks-prezidanto de UEA ricevis ŝtatan premion en Barato



Ĉi-jare, la Premio Vidyasagar estas por la unua fojo aljuĝita al esperantisto. Tiun ĉi premion, rilatantan al la tuta verkaro de la respektivaj aljuĝitoj, la registaro de la gubernio Okcidenta Bengallando (en Barato) lanĉis en 1980 honore al la memoro de la granda klerulo, edukisto, instituci-konstruinto kaj soci-reforma pioniro Ishwar Chandra Vidyasagar (1820–1891). En 2021 ĝi estis rebaptita al Premio Vidyasagar-Dinamoyee (kunhonore al lia edzino) kaj estas nun aljuĝata de la registara fako pri supera eduko kunlabore kun la nove establita *Vidyasagar Academy* (akademio Vidyasagar). La 26-an de septembro 2021, okaze de la 201-a naskiĝdatreveno de Vidyasagar, la esperantista lingvisto Probal Dasgupta kaj tri samtempaj premiitoj (en aliaj sociaj kaj edukaj terenoj tuŝitaj de la pioniraj strebadoj de Vidyasagar)! ricevis la Premion. Tio okazis en la ejo de la akademio Vidyasagar en Kolkato, domo en kiu la klerulo mem loĝis en la finaj jaroj de sia vivo.

Probal Dasgupta, studinta en sanskrita kolegio (Kolkato), la dekana kolegio de Puneo kaj novjorka universitato, instruis lingvosciencan en la universitato de Kolkato, la dekana kolegio, la universitato de Hajderabado kaj la barata statistika instituto en Kolkato; de tiu lasta posteno li emeritiĝis en 2018. Esperanton li helpinstruis en 1978 kun David Jordan en la sanfranciska somera kursaro, kiu estis la praformo de NASK, kaj en 1988 kun Marjorie Boulton en la barlastona somera kursaro.

Menciindas ke dum la jaroj 2007–2013 Probal Dasgupta plenumis taskon de prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

Gazetaraj komunikoj de UEA

En 2023 UEA kongresos en Torino, Nord-okcidenta Italio

Por la 108-a Universala Kongreso (UK), post tri jaroj, la Estraro de UEA unuanime elektis Italion kiel kongreslandon. La kvaran fojon UK okazos en Italio. La gastiga urbo, Torino, estis la unua ĉefurbo de Italio (1861–1865). Urbo en kiu kunfandiĝas la itala kaj la franca etoso, kie aktivis gravaj

intelektuloj kiel Norberto Bobbio, Italo Calvino, Clelia Conterno Guglielminetti, Natalia Ginzburg, Primo Levi, Cesare Pavese kaj Elio Vittorini, kaj en kies universitato longtempe profesiiis Giorgio Canuto, iama prezidanto de UEA.

Post la dua mondmilito, Torino estis celo de multnombraj suditalaj enmigrintoj, allogitaj de la grandaj fabrikoj, kio donis al la urbo ŝancon malfermiĝi, akcepti kaj helpi al bezonantaj eksteruloj. Tiurilate, aparte grava estis la aŭtomobila fabriko FIAT, kie deĵoris Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, dank' al kiuj la fabriko eldonis kelkajn broŝurojn kaj mallongajn filmetojn en Esperanto, por diskonigi la urbon kaj la novajn aŭtojn.

Itala Esperanto-Federacio invitis kongresi en Torino ankaŭ pro la tre vigla Esperanto-grupo, kie kunvivas gravaj doĵenoj de la movado, kiaj Giancarlo Fighiera, Fabrizio Pennacchietti, Pedro Aguilar-Solà, kaj la nova generacio: mezaĝaj kaj junaj aktivuloj kun alta lingvo-kono. Subtenis la inviton ankaŭ du membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA, la italoj Giuliano Turone, juĝisto, kaj Giorgio Novello, baldaŭa ambasadoro de Italio en Nederlando.

La 108-a UK estas planata de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. La kongresejo estos la ĉefsidejo de Politekniko, la urba universitato por estontaj inĝenieroj, kiu ebligos favoran kotizon. Parolante pri kotizo, ne maltrafu la unuan, la plej favoran aliĝperiodon de la 106-a UK ĉe uea.org/kongresoj.



Vespera panoramo de Torino

Barbara Pietrzak

Szczawno-Zdrój

Hodiaŭ mi invitas vin gesinjoroj al la urbo, kie en la jaro 2012, Silezia E-Asocio omaĝis la 125-jariĝon de Esperanto – memorigante, ke en 1912 gastis tie kuraccele d-ro Ludoviko Zamenhof. Tie, en la jaroj 2007-2013, Silezia Esperanto-Asocio organizadis aŭguste la Internacian Esperanto-Feriadon. En decembro 2013, en la urbo okazis la Junulara Esperanto-Semajno, la komuna aranĝo de la Pola Esperato-Junularo kaj Germana Esperanto-Junularo.

En la daŭro de la historio vizitis la urbon ankaŭ aliaj eminentuloj kaj famuloj, kiel la germana imperiestro Wilhelm la 2-a Hohenzollern, la reĝo de Greklando - Konstantin la 1-a, Wintson Churchill, la pola komponisto Henryk Wieniawski kaj multaj aliaj.

Temas pri Szczawno-Zdrój (legu. Ŝĉavno Zdruj) en Malsupra Silezio, en la centra parto de Sudety-Montaro, kiu estas unu el la plej malnovaj kuraĉlokoj en la regiono. Invitante al Szczawno, oni devas mencii pri ĝiaj belaj panoramoj, milda montregiona mikroklimato, pura aero, mineralaj fontoj kaj moderna kuraca infrastrukturo. Szczawno-Zdrój logas vizitantojn dum la tuta jaro – printempe pro florantaj rododendronoj en la Kuraĉloka Parko, somere en la Sveda Parko pro aliaj maloftaj plantospecioj, aŭtune pro koloroj de la arbofoliaro kaj vintre pro la neĝoblanka, fabeleska etoso.

La unua mencio pri Szczawno, ankoraŭ vilaĝo, devenas el la dokumento de la Piast-dinastia princo Henriko la 1-a Barbohava. Ekde la 13-a jarcento ĝi estis la havaĵo de la kastelo Książ. En 1392, post la morto de la princino Agnieszka, la edzino de Bolko la 2-a, Szczawno troviĝis en ĉeĥaj aŭ germanaj manoj. En 1509 aĉetis ĝin Conrad von Hochberg, kies posteuloj herede posedis Szczawno ĝis 1931.

Historiistoj ĝis nun ne klarigis precize, kiel kreiĝis Szczawno. Onidire la unua arbara setlejo ekestis sur la nuna Altaĵo de Gedymin. La vivodonaj mineralaj fontoj ŝprucis tie jam antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj. Pruvis tion arkeologiaj esploroj.

Jam antaŭ jarcentoj, tieaj bestoriĉaj arbaroj kaj fiŝabundaj riveroj logis ĉasistojn, abelbredantojn. En pli posta periodo serĉantojn de arĝento- kaj plumboercoj. Senarbarigataj terenoj ebligis kultivadon de plantoj, bredadon de brutoj kaj ŝafoj. La administracia organiziĝo kaj princaj privilegioj de la plej fora tempo ebligis la evoluon kaj bonstaton de Szczawno. Komence ĝi estis konata sub la slava nomo Solicowo. Dum la unuaj jaroj de la germana koloniado la nomo ŝanĝiĝis al Salzbornn, kaj transformiĝis, dum la prusa

regado, al Salzburnn. En la intermilita periodo kaj post la dua mondmilito, la nomo denove ŝanĝiĝis kaj revenis al la unua slava nomo kaj ricevis la formon Solice Zdrój. Ekde 1947 validas la nomo Szczawno-Zdrój, kiu rilatas al la aperantaj tie acidaj mineralaj akvoj riĉe saturitaj de karbondioksido.



Atrakciecon de Szczawno-Zdrój kreas ne sole la salubraj fontoj, sed ankaŭ la turismaj valoroj de la regiono: ĉirkaŭantaj la urbon altaĵoj, valoj, belegaj panoramoj. En la urbo mem troviĝas du parkoj kaj multaj verdoriĉaj lokoj. La menciitaj anglastilaj parkoj apartenas al la plej grandaj kaj plej belaj en polaj kuraclokoj.

La salubraj kaj sanigaj valoroj, de la lokaj fontoj estis pruvitaj kaj konfirmitaj jam en la 16-a jarcento. Sed la kuracloko evoluelanon ricevis ekde 1816, laŭ la iniciato de d-ro Aŭgust Zemplin. Tiutempe estis konstruita trinkejo de mineralaj akvoj, teatrejo, orkestra pavilono, hoteloj kaj gastejoj. La kuracloko famiĝis en la tuta Eŭropo. Szczawno-Zdrój daŭre plenumas la rolon de kuracloko. La plej alte taksataj estas la mineralaj akvofontoj *Mieszko*, *Dąbrówka*, *Młynarz kaj Marta*. Oni kuracas tie malsanojn de movorganoj, de la spirvojoj, malsanojn de la digesto kaj urinosistemoj kaj laringologiajn afekciojn.



Danke al la klopodoj de la loĝantoj kaj aŭtoritatoj, grandiĝas la atrakcieco de Szczawno-Zdrój. Ekde 1966 ĉiujare okazas tie festivaloj de Wieniawski-muziko. Tiu pola komponisto ne nur estis tie kuracato, sed ankaŭ donis multajn koncertojn.

Ĉio ĉi do – la situo, panoramo, freŝa, pura areo, mineralaj fontakvoj kaj arkitekturaj vidindaĵoj kaŭzas, ke al Szczawno-Zdrój rapidas multaj turistoj, ripozantoj kaj feriantoj.

Robert Kamiński

Mieczysław Bekker kaj luna revo

En la 4-a numero de la ĉi-jara "Pola Esperantisto" aperis artikolo pri la plej multekosta veturilo en la historio - uzata por veturi sur la luno dum la Apollo-spaca misio. Mi skribis ĝin per iomete ironia tono, sed konstrui ĉi tiun veturilon estis bonega teknika atingo. La artikolo mencias la nomon de la pola profesoro Mieczysław Bekker, kiel unu el la projektantoj de ĉi tiu veturilo. Sendube, li estas elstara persono, inda por priskribi lin en aparta artikolo.

Ni rigardu la sorton de Mieczysław Bekker. Li diplomiĝis ĉe la Varsovia Politekniko, pro kiu li aprezis sian tutan vivon. Li finis sian studadon kiel ne tro bona studento. Ofte tiuj, kiuj estas geniaj, ne ricevas bonajn notojn.

Post la suboficira lernejo kaj laboro en armeaj entreprenoj, li ricevas inviton al la Varsovia Politekniko, por prelegi pri veturilo-movado sur la grundo. En la jaroj 1936–1939 li ankaŭ estis docento ĉe la Milita Studo de la Varsovia Politekniko, kie li Kreis Laboratorion de Specialaj Veturiloj. Ĉi tie li atingis siajn unuajn sciencajn sukcesojn. Bedaŭrinde, la giganta laboratorio ne komencis funkcii pro la eksplodo de la milito en 1939. Dum sia elmigrado, li daŭrigis ĉi tiun laboron en laboratorioj en Kanado kaj Usono.

Post la eksplodo de la milito, li eskapis al Rumanio helpe de sekretaj organizaĵoj. Sekve li kaj lia familio estis rapide translokigitaj al Francio, kie li tuj komencis labori por la loka Ministerio pri Defendo. Post la kolapso de la franca registaro, li devis translokiĝi en la sudon de Francio, al Marsejlo, kie li daŭrigis sian esplorlaboron.

Du jarojn poste, en 1942, li translokiĝis al Kanado, kie li laboris ĉe la Esploro pri Kirasaj Armiloj, En 1943, kun la konsento de la pola emigracia registaro, li aliĝis al la kanada armeo. Li forlasis la armeon de Kanado en 1956 kun la rango de subkolonelo. En 1956 li forvojaĝis al



Usono, kie li laboris ĉe Milita Laboratorio de Teraj Veturiloj kaj prelegis ĉe la Politekniko. Li baldaŭ fariĝis profesoro ĉe Universitato de Miĉigano en Ann Arbor kaj akceptis la direktoran postenon de Espolorinstituto de General Motors en Santa Barbara.

Li komencis esplorojn, kiuj temis pri la tuta teorio de veturila moviĝado: veturila strukturo kaj esplorado pri grundaj ecoj. Mieczysław Bekker kreis la tutan metodaron por mezuri grundajn ecojn. Li ankaŭ faris serion da studoj pri tirfotroj.



Profesoro Bekker ŝoforas lunan veturilon

Bekker proponis kunligi esplorfortojn kun la britoj kaj italoj, kiuj ankaŭ esploris tiujn temojn, kaj krei sciencan, kiun li nomis "terramechanika" - la scienco de termekaniko, aŭ veturilo-grunda mekaniko. Li estis la iniciatinto kaj kunfondinto de la internacia

asocio Internacia Societo por Teraj-Veturilaj Sistemoj (ISTVS), kiu ankoraŭ ekzistas hodiaŭ.

Prof. Bekker postlasis multajn sciencajn verkojn. Li estis la verkinto de tri fundamentaj verkoj en la kampo de teorio de survojaj veturiloj: „*Theory of land locomotion*” (1956), „*Off-the-road locomotion*” (1960) kaj „*Introduction to terrain vehicle*” (1969).

En 1961, la usona, kosma agentejo NASA anoncis grandan konkurson por luna transporta veturilo. En ĝi startis kelkdek firmaoj, inter ili General Motors-teamo, kies membro estis Mieczysław Bekker.

La teamo gajnis la konkurson kaj la produktado de lunaj veturiloj estis komencita. Tio estas laborrezulto de multaj homoj, sed Bekker respondecis pri la plej gravaj aferoj, inkluzive pri la kurado, kaj la mova forto.

La profesoro estas nekredible efika viro. La fakto, ke li multe laboris por la militistaro, faris lin malmulte konata en Pollando. Ĉiu lia scio kaj laboro estis sekreta, kaŝita de la mondo, kaj liaj inventoj estis uzitaj de la militistaro.

Tamen prof. Mieczysław Bekker estis fama figuro en la scienca mondo. Li ricvis la titolon *doktoro honoris causa* de la Politekniko en Munkeno, Carleton Universitat en Otavo, kaj la universitato en Bologna. Lia nomo estis registrita en la Aleo de Famaj Esploristoj de Kosmo. Tamen ni ankoraŭ malmulton scias pri li en Pollando.

La Teknologia Universitato de Poznań kaj la Teknologia Universitato de Varsovio provis honorigi lin per honora doktorigo sed la Ministerio pri Scienco, Supera Edukado kaj Teknologio rifuzis petojn. La kialoj estis politikaj - la malvarma milito kaj laboro por la usona armeo. Ne eblis honori scienculon laborantan por fremda malamika potenco, kiu tiutempe por Pollando estis Usono.



Kie nun oni povas trovi memoraĵojn pri la profesoro? En Strzyżów, la urbo de lia naskiĝo, estas memortabulo. **En Konin, kie li vivis, troviĝas skvaro, nomita per lia nomo kun obelisko** kaj plako informanta pri la plej gravaj etapoj de lia scienca vivo. Lia bildo aperas sur murpentraĵo en Szczecin. Memortabulo al li ankaŭ estis metita ĉe la Fakultato pri Aŭtomobiloj kaj Konstrumaŝinoj de la Varsovia Politekniko. La Muzeo de la Varsovia Politekniko havas scienca arkivon de la profesoro.

La luno kaj la kosmo estis liaj revoj. Jam kiel infano, li kaj lia frato konstruis teleskopojn, observis planedojn kaj stelojn. Li iel volis atingi la lunon, kaj oni povus diri, ke ero de li vojaĝis al nia satelito kaj restis tie en la formo de tri veturiloj, parkitaj sur la luno ĝis hodiaŭ. Post kiam, demandita, ĉu liaj revoj realiĝis, li respondis: "De kiam mi komencis mian lastan laboretapon (luna veturilo), ĉio, kion mi aŭdis kaj legis, de Twardowski ĝis interplanedaj misvojoj, fariĝis realo."

Varmia-Mazuria Societo de Esperantistoj

Andrzej Gielert



En Olsztyn antaŭ nelonge forpasis Andrzej Gielert, multjara prezidanto kaj vicprezidanto de la loka filio de Pola-Esperanto Asocio kaj poste de Varmia-Mazuria Societo de Esperantistoj.

Dum pli ol 40 jaroj li pasie okupiĝis pri la evoluo de Esperanto movado en Olsztyn kaj en ĝia regiono. Komence, krom sia Esperanto-agado, li multe korespondis kun multaj esperantistoj el Pollando kaj eksterlando. Multaj homoj vizitis lin en lia domo, kie li kaj lia edzino Brygida, gastigis multajn eksterlandajn geesperantistojn. Kiam poste

alvenis tempo de interreto, liaj multnombraj kontaktoj translokiĝis al la reto. Li aktive okupiĝis pri la evoluo de Esperanto, organizante multajn lingvajn kursojn kaj aranĝojn. En la lastaj jaroj li provis organizi kurson de Esperanto en la loka universitato. Bedaŭrinde, la pandemio de Covid 19 malhelpis liajn klopodojn tiurilate.

Li estis malsana dum tre longa tempo, sed li ne montris tion. Oni povus diri, ke li vivis por la lingvo kaj ideo de Esperanto.

Andreo, ni dankas vin pro kontribuo al Esperanto. Ni memoros vin kiel tre fervora esperantisto. Samideanoj el Olsztyn.

Lingvosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

Lokaj rolvortetoj *Antaŭ* (kaj *malantaŭ*)

Antaŭ montras pozicion ĉe tiu flanko, kiu estas plej proksima al la parolanto, aŭ ĉe tiu flanko, kiu estas la plej grava, la ĉefa. La *antaŭa* flanko de homo aŭ besto estas la flanko de la vizaĝo kaj okuloj. La preciza senco de *antaŭ* do dependas de la perspektivo de la parolanto:

- ***Antaŭ la domo*** staras arbo. = *Ĉe la antaŭa flanko de la domo...*
- ***Vespere antaŭ la pordo*** haltis veturilo.
- *Ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo.*
- ***Antaŭ nia militistaro*** staris granda serio da pafilegoj.
- *Oni metis antaŭ mi manĝilaron.*

Pozicio en sinsekvo

Antaŭ povas ankaŭ montri pozicion en ia sinsekvo, pozicion, kiun sekvas alia. Ofte ĉeestas tiam ankaŭ pure loka signifo:

- *Mi iras antaŭ vi.* Mi iras unue, vi sekvos post mi.
- *M estas antaŭ N en la alfabeto.*

Sinsekva *antaŭ* estas tre simila al tempa *antaŭ*.

Figura uzo

Antaŭ ofte montras ĉeeston aŭ influon de io grava:

- *Li tute ne sentis timon antaŭ ŝi.* = *...kiam ŝi ĉeestis.*
- *Mi ne kaŝis antaŭ li eĉ la plej malgrandan cirkonstancon.* = *...kaŝis, kiam*

li ĉeestis...

- *Ili ne havis plu kuraĝon antaŭ la Izraelidoj.*
- *Mi estas eldonisto, respondeca antaŭ la publiko.*
- *La dialektoj kaj provincialismoj iom post iom perdiĝis antaŭ la fortiĝanta komuna literatura lingvo.*

Antaŭ povas montri estontecon, kiu kvazaŭ staras antaŭ iu:

- Ili havis ja **antaŭ si** grandan vojaĝon.

Antaŭ povas montri pozicion pli altan en graveco aŭ rango:

- La pliboneco de Esperanto **antaŭ Volapük** estas tiel *frapante granda*, ke ĝi falas al ĉiu en la okulojn tuj de la unua rigardo. Se oni metus la lingvojn en ordo de boneco, Esperanto starus antaŭ Volapük.

- Esperanto devis esti **antaŭ ĉio** *eksterordinare facila*. Facileco estis la plej grava postulo.

- Li ne atentis la vizaĝon de princoj, kaj ne preferas riĉulon **antaŭ malriĉulo**.

Antaŭ + direktaj rolmontriloj

- La bona virino metis **antaŭ lin** la plej bonajn manĝaĵojn, kiujn ŝi havis. = ...al pozicio antaŭ li...

- Ŝi venis **antaŭ la reĝon** kaj stariĝis antaŭ la reĝo. = Ŝi venis al pozicio antaŭ la reĝo kaj stariĝis tie.

- La cigno klinis la kapon kaj falis malrapide **antaŭ iliajn piedojn**, kie ĝi restis senviva.

- Marta forprenis la manplaton **de antaŭ la okuloj**. = ...de pozicio antaŭ la okuloj. Ofte sufiĉas simpla *de* anstataŭ *de antaŭ*.

- Mi jam ĝis nun... trovus tiun, kiu malaperis **de antaŭ miaj okuloj**.

Ofte *antaŭ* aperas sen direkta N-finaĵo kvankam temas klare pri movo. La klarigo estas, ke oni rigardas ion alian kiel efektivan celon de la movo:

- Jadvinjo [...] alŝovis al la tablo oportunan brakseĝon kaj metis **antaŭ ĝi kelke da libroj kaj sufiĉe grandan nombron da dikaj kajeroj**. = ...metis **sur la tablon** antaŭ ĝi... La efektiva celo de la metado, la tablo, estas subkomprenata. Sed ankaŭ la brakseĝo (= ĝi) povas esti rigardata kiel celo, kaj oni tute bone povas uzi *metis antaŭ ĝin* en tiu frazo.

Tempo

Antaŭ ofte montras tempon pli fruan ol alia tempo. Tiam *antaŭ* staras antaŭ esprimo de tempo, okazaĵo aŭ ago. Tempa *antaŭ* estas la malo de tempa *post*:

- Ili ordonis al mi veni **antaŭ la vesperiĝo**. = ...pli frue ol la vesperiĝo.
- **Antaŭ tri tagoj** mi vizitis vian kuzon. = Je tri tagoj pli frue ol nun...
- La pastro, kiu mortis **antaŭ nelonge** (aŭ **antaŭ nelonga tempo**), loĝis longe en nia urbo.

- Ĉiu diskutota demando estas ja publikigita tri monatojn **antaŭ la kongreso**.

Tempa *antaŭ* povas ankaŭ stari antaŭ vortoj, kiuj ne per si mem montras tempon, okazaĵon aŭ agon, sed kiuj tamen en la frazo reprezentas ion tian:

- **Antaŭ la lango** laboru la cerbo. = Antaŭ **laboro** de la lango, laboru cerbo.

Tempa *antaŭ* estas ofte uzata en esprimoj de horo: *dek minutoj antaŭ la tria* k.s.

Roman Dobrzyński

Parolantaj kapoj

Kiel fano de Don Kiĥoto mi ŝatas epizodon, en kiu la kavaliro de La Manĉo, veninte al Barcelono, konversacias kun la „parolanta kapo¹”. Tiu ĉi artefakto kapablis respondi ĉiujn demandojn pri la aferoj videblaj kaj nevideblaj en la mondo. Cervantes sciigas legantojn, ke la kreinto de la ĉioscia kapo estis polo. Mi orgojlas, ke mia samlandano anticipis je kvar jarcentoj ĉiujn retajn scifontojn, inkluzive de la Esperanta Vikipedio.

Tiu ĉi aventuro de Don Kiĥoto reaperas en mia imago, dum mi, trempita ĝiskole en la varma akvo de la ronda bankuvo, vidas kelkajn parolantajn kapojn. Ili flosas sur la akvo kvazaŭ pilkoj kaj parolas Esperante. Unu kapo post la alia salutas mian kapon kaj prezentas sin. Ago Takaŝi ne devas sin prezenti. Li aranĝis, nome de la japana kultur-religia organizo Oomoto, mian viziton al ĝia Centro, en la urbo Kameoka, por la unua duono de la jaro 2009.

Post longa vojaĝo mi volis vespere bani min. Ne necesis gvidanto, ĉar sekvante sagojn kun surskriboj en la japana lingvo kaj en Esperanto, mi facile trovis la banejon. Ĉirkaŭe videblis nudaj viroj, kiuj, sidante sur malgrandaj taburetoj, lavis sin. La multfoja sapumado kaj duŝado estas longa ceremonio. La korpaj en la stato de la absoluta pureco rajtas plonĝi en la bankuvo. Japanoj adoras tian formon de ripozo. Mia pola kapo plaĉe flosas kaj interparolas en la internacia lingvo kun la japanaj kapoj. Mi esprimas mian ravon pro dulingvaj informoj, ekzemple: *Estas kutimo ne enporti bantukojn en la banejon*². En Eŭropo anstataŭ: *Estas kutimo - oni vidas: Estas malpermesite*. La Centro de Oomoto konsistas el kvin ĝemelaj blokoj aparte starantaj kaj ligitaj per koridoroj. Ĉe iliaj enirejoj videblas elegantaj formuloj: *Bonvole memoru demeti la ŝuojn*. Mi „bonvole memoras” kaj ĉiam deprenas miajn ŝuojn ĉe la ĉefenirejo kaj metas ilin sur breton. De la apuda breto mi prenas paron da pantofloj kaj daŭrigas la itineron.

En ĉiu domo oni uzas pantoflojn de alia koloro. Okazas, ke mi portas verdajn pantoflojn kaj vidas ruĝajn sur piedoj de aliaj preterpasantoj. Necesas

¹ Miguel de Cervantes Saavedra *La inĝenia nobelo Don Kiĥote de La Manĉa*, dua volumo, ĉapitro 62, tradukis Fernando de Diego, eldonis eldonis Fundación Esperanto, Zaragozo 1977.

² Oni uzas elektran sekigilon.

reveni kaj korekti la eraron. Finfine mi volas eliri eksteren kaj sekvas saĝetojn, montrantaj direkton de eskapo kaze de incendio. Jen sukceso! Estas elirejo, sed tie mankas miaj ŝuoj. Verŝajne mi lasis ilin en alia loko. Tiukaze oni devas ankoraŭfoje transfiguriĝi en Tezeon kaj – sen la helpo de Ariadno – erarvage serĉi en la japana labirinto siajn ŝuojn. Mi radikale solvis la problemon tiamaniere, ke mi aĉetis kvin ŝuparojn kaj lasis ilin deĵori en ĉiuj enir- kaj elirejoj. Sed pli fortan rigoron mi frontas, irante al mia loĝapartamento, ĉar ĉe ĝia pordo finas sian validecon la koridoraj pantofloj. Mi transpasas la sojlon per alia paro, sed ili ne rajtas enpaŝi la dormejon. Tie deĵoras la lokaj pantofloj, kie ankaŭ sufiĉas ŝtrumpoj. Oni enlitiĝas nudpiede.



Centro de Oomoto en Kameoka

Siajn pantoflojn havas necesejo. Ĝi estas supermoderna. La pelvo funkcias ankaŭ kiel bideo. En tiu ĉi loko oni povas senti sin kiel en kosmoŝipo. Imagu varmigeblan sidilon, provizitan per panelo kun flagrantaj

diodoj kaj plurkoloraj prembutonoj. Iliaj funkcioj estas klarigitaj nur japane. Per la metodo de provoj kaj eraroj mi malkovras, kiel oni akvumas pelvon kaj kiel reguligas temperaturon de sidilo. Por esplori aliajn funkciojn, mi surgenuiĝas super la polvo kaj kaose premas butonojn. Subite de sub la sidilo elrampas tubeto kaj ŝprucas varmetan akvon sur miajn vangojn. Fakte ĝi celis... la sidvangojn.

Japanoj mem nomas sin posedantoj de la „luna civilizacio”, ĉar ĝi respegulas fremdajn kulturojn, ĉefe tiun de Ĉinio. Sed tio ne estas nur imitado, sed ankaŭ perfektigo. Ekde la fino de la 19-a jarcento Japanio abunde ekspluatas la civilizacion de la Okcidento kaj ankaŭ ĝin modifas laŭ la propra maniero. La pantoflo nomiĝas japane „surippa”. En la japana prononco la vokalo „u” estas apenaŭ aŭdebla, la konsonanton „r” oni prononcas kiel „l”, rezulte „surippa” sonas kiel „slipa” kaj fakte ĝi estas la angla vorto „slipper” – pantoflo³. *Bonvole memoru rideti!*

³ Pli multe en la libro: Roman Dobrzyński, *Rakontoj el Oomoto*, Skonpres, 2013

Anton Oberndorfer

Interreto plibonigas memorkapablon de pensiuloj



Surfado en interreto, dum pensiula aĝo, povas plibonigi la kognan produktivon. Tion montras esploroj, dum kiuj estis testata la memorkapablo de pli ol 2100 pensiuloj, el dek eŭropaj landoj.

La sciencistoj de la brita universitata mastrumada lernejo en Lancaster uzis por sia esploro la datumaron pri "sano, pliaĝiĝo kaj pensiuleco en Eŭropo" kun informoj pri sanstato, profesia kariero kaj sociekonomia statuso de homoj en progresinta aĝo. Ĉe specimena testo de 2105 homoj en pensiula aĝo el Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Israelo, Hispanio, Svedio kaj Svislando, kiuj ĝuas la pension de almenaŭ la jaro 2004, la sciencistoj prilumigis ties kognan produktivon.

Ili uzis tiucele memorteston, ĉe kiu estis montrata al la partoprenantoj listo de dek vortoj, kiujn ili devis parolripeti tuj sekve kaj, ankoraŭfoje, post kvin minutoj. Montriĝis, ke personoj, kiuj uzas interreton ekde sia pensiuliĝo, povis rememori averaĝe 1,22 vortojn pli ol personoj, kiuj ne uzas interreton.

Kiel la esploristoj raportas en faka ĵurnalo, virinoj evidente profitas pli de interreto ol viroj: Virinoj, kiuj regule surfas en interreto, povis rememori 2,37 vortojn pli ol virinoj, kiuj ne konektiĝas al interreto. Aliflanke viroj, en pensiula aĝo, povis rememori 0,94 vortojn pli ol ne-surfantaj pensiuloj. "Niaj rezultoj montras, ke uzado de interreto, post pensiuliĝo, kondukas al signifa bremsado de la kognna malkapabliĝo", klarigis la studestro.

Krome montriĝis, ke tiuj personoj, kiuj jam dum sia profesia vivo estis laborantaj ĉe komputilo kaj estis aktivaj en interreto ankaŭ post la pensiuliĝo, estis ankaŭ kogne pli produktivaj. Entute oni konstatis inter la landoj grandajn diferencojn rilate al la uzado de interreto. En Italio surfis nur 12 procentoj de la pensiuloj, en Danlando pli ol 60 procentoj. En Aŭstrio 28 %, kio situas la landon sub la averaĝo de la partoprenintaj landoj (35,1 %).

La sciencistoj akcentas, ke ili konsideris dum la esploroj diversajn aspektojn, kiuj estas aĝo, kleriĝa nivelo, profesiaj kvalitoj ktp. Ili pro tio estas certaj, ke la rezultoj estas firmaj, kaj ke tiuj rezultoj koncernas nur la uzadon de

interreto post pensiuliĝo. Ili aliflanke ankoraŭ ne scias, kio precize kaŭzas la pozitivan efikon pri la kogna produktivo, ĉu estas ekzemple la interago kun aliaj homoj en interreto, ĉu la havigo de informoj pri la partopreno en sociaj aktivecoj aŭ ĉu estas simplaj taskoj, ekz. aĉetoj per interreto.

Leterkesto



Jerzy Dryja, Ĉu vi scijas?

En Varsovio agas la sportklubo kun la nomo ESPERANTO. Ĝia plena nomo estas Lerneja Sporta Klubo Esperanto (origine *UKS Esperanto Warszawa*). Ĝi estas la klubo de retpilklo por junulinoj, kaj ĝia sidejo estas Centro de Sporto kaj Fizika Trejnado (pole: *OSiR*), ĉe la strato Obozowa 60, en la loĝkvartalo Koło de la distrikto Wola. La nomo de la klubo devenas de la



onomo Esperanto-strato en la Wola-distrikto de Varsovio, ĉe kiu estis la unua sidejo de la klubo. La retpaĝaro kaj Fejsbuko de la klubo informas pri ĝia vigla sporta agado kaj ĝiaj atingoj pri retpilklo.

<http://www.uksesperanto.pl/>, <https://it-it.facebook.com/UksEsperanto/>

La retvendejo „LIBRISTO” kun ĉefsidejo en Vsetín, Ĉeĥio kaj ĝia filio en la pola Cieszyn, Pollando ofertas librojn en 20 lingvoj de la mondo, ĉefe en la angla kaj germana. Estas tie ankaŭ sufiĉe ampleksa oferto de libroj en kaj pri Esperanto. “Libristo”, establita en 2008, estiĝis dum 13 jaroj la librovendejo, oferanta la plej grandan sortimenton de libroj en la meza Eŭropo. Libroj estas venigataj de 59 liverantoj el la tuta mondo. <https://www.libristo.pl/>



Estimataj samideanoj! Mi estas nova en Esperantujo. Bedaŭrinde, mi ne partoprenis en la Esperantaj Preĝtagoj en mia urbo Częstochowa. Mi ne sciis, kiam ĝi okazas. Krom tio, mi estas kontenta trovante du interesajn retejojn, kiuj informas pri la preĝtagoj. La unua ligilo gvidas al radia elsendo de *Radio Jasna Góra* kaj interesa intervjuo kun la landa animzorganto de polaj esperantistoj, la pastro Roman Gmyrek. La dua ligilo

prezentas mallongan informon pri la aranĝo en la retejo de la gazetara oficejo de monaĥejo Jasna Góra.

- <https://soundcloud.com/radiojasnagora/2021-10-10-ks-roman-gmyrek-krajowy-duszpasterz-esperantystow-katolickich>,

- <http://www.jasnagora.com/wydarzenie-15254>

Amike salutas ĉiujn legantojn, *Łukasz Bera*.



Adam Wilkus

Solvoj de la krucenigmoj en PE 1-4/2021

Krucenigmo pri fungoj (PE 1/2021):

1. LA NOBLA BOLETO, 2. LA POLVOFUNGO, 3. LA MUŝMORTIGA AMANITO, 4. LA SANGOSUKA LAKTARIO, 5. LA ĈAMPINJONO, 6. LA KANTARELO, 7. LA PLEŬROTO, 8. LA MORKELO 9. LA BUTERFUNGO, 10. LA MIELA ARMILARIO, 11. LA GRANDA LEPIOTO, 12. TRUFO, 13. TINDROFUNGO.

Krucenigmo pri floroj (PE 3/2021):

1. NEFORGESUMINO, 2. TULIPO, 3. SUNFLORO, 4. PAPAŬO, 5. KONVALO, 6. PENSEO, 7. LEONTODO, 8. LEKANTETO, 9. ROZO.

Krucenigmo pri mamuloj (PE 4/2021):

1. ERINACO, 2. TALPO, 3. TAŬRO, 4. MARMOTO, 5. MEFITO, 6. MARTESO, 7. ĈAMO, 8. KASTORO.



Paulina Jaworska

Ni renkontiĝu en Sopot

Triurba Esperantista Asocio „TORENTO” kore invitas al klubaj kunvenoj. Ni renkontiĝas en nia klubejo en Sopot, ĉe la str. Armii Krajowej 94 marde je la 17:00 kaj en la sopota biblioteko "Sopoteka", ĉe la str. Kościuszki 14 - (konstruaĵo de la ĉefa stacidomo) en ĉiu dua lundo, je la 17:30. Aktualajn informojn pri niaj renkontiĝoj kontrolu en la kalendaro sur nia retejo.



<https://www.facebook.com/ESPERANTO.TROJMIASTO/>
aŭ skribu al: torentosopot@wp.pl

Kalendaro de Esperanto-aranĝoj

Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2021 kaj 2022

1-9.09. 2021	54-a Internacia Esperanto-Feriado en Łądek-Zdrój	Silezia Esperanto-Asocio pomer@wp.pl
10-12.09. 2021	„Esperanto sur strando” en Sopot Temo „Urbo kaj akvo”	Triurba Esperantista Asocio "Torento" https://www.facebook.com/groups/ESPERANTOWSOPOCIE
12.09.2021	100-a naskiĝtago de Stanisław Lem. Prezento pri Esperanto-traduko de „Solaris”. Ekspozicio de diverslingvaj eldonoj.	Bjalistoka Esperanto-Societo, https://espero.bialystok.pl/eo
12.09. 2021	9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021 - koncerto de venkintoj	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl
17-19.09. 2021	36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES 2021	„Esenco“ Poznań, http://www.arkones.org/pl NE OKAZIS
8-10. 10.2021	45-aj Esperanto-Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
11.2021	<i>Glivicea Rendezvuo de Praktikantoj kaj Uzantoj de Esperanto GRUPE 2021</i>	<i>PEA-filio en Gliwice nuligita</i>
11.12. 2021	Recita konkurso “Vortbeleco en Esperanto” en Góra	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl , informado.eo@gmail.com
10-12. 12.2021	22-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj	Bjalistoka Esperanto-Societo
28.12. 2021 04.01.22	13-a Junulara Esperanto-Semajno JES en Wittenberg (Germanio)	Pola Esperanto-Junularo Germana Esperanto-Junularo www.pej.pl
10-22.6. 2022	44-a Ĉebalta Esperantista Printempo En Mielno-Unieście	Pola Esperanto Asocio, Filio en Gliwice, Stanisław Mandrak, 44-114 Gliwice, ul. Kormoranów 16/5 stanislaw.mandrak@gmail

Universalaj Kongresoj de UEA

17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto en Belfasto (Nord-Irlando) okazos en virtuala formo (2-a Virtuala UK)	Universala Esperanto-Asocio uea.org
6-13.08. 2022.	La 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 okazis nur virtuala kongreso.	Universala Esperanto-Asocio uea.org
29.07- 5.08. 2023	La 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino (Italio)	Universala Esperanto-Asocio uea.org

Elektitaj renkontiĝoj en najbaraj landoj

17-22. 10.2021	9-a EMA Esperantista Migrado Aŭtuna en la Palatinata Arbaro, okcidenta Germanio	www.esperanto.de/eo/ema-eo , ema@esperanto.de
9-17.07. 2022	56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) en Klaipėda, Litovio	Litova Esperanto-Asocio litova.ea@mail.lt , anasturte@gmail.com , http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

Diverse, facile, bonguste

Teresa Nemere

Ĉina specialaĵo

Serĉante agrablaĵon por aŭtunaj tagoj, mi trovis, inter miaj libroj, la ĉinan kuirlibron en Esperanto: „Ĉinaj familiaj pladoj” kaj en ĝi recepton, por la eble interesa frandaĵo: „Varma, kandizita batato”. Mi tuj provis ĝin prepari kaj mia familio estis kontenta. Mi ankaŭ. La recepto estas facile realigebla, batatoj nun facile aĉeteblaj, do mi proponas utiligi la proponon.

Necesaj ingrediencoj:

batatoj - 500 g

ovoj - 2

nigra sezamo - 2 kuleroj

seka amelo - 100 g
kolzsema oleo - 1000 g
blanka sukero - 150 g
ĉinaj pimentaj fruktoj
(spicheroj) 4-5

Preparado:

1 - Lavu batatojn, sen-
ŝeligu ilin kaj tranĉu en ne tro
dikajn pecojn, maldike kovru
ilin per la seka amelo.

2 - Batu la ovojn en bovlo
kaj miksu ilin kun la seka amelo, por fari densan gluon.

3 - Varmigu per arda fajro la kolzseman oleon en pato, fritu en ĝi la
pimentajn berojn ĝis bruliĝo kaj forigu ilin. Metu la batatpecojn, maldike
kovritaj per amelgluo, en la paton kaj fritu ilin turnante, por ke ili ne
kungluigu. Kiam ili flaviĝos, elpatigu ilin per legomkribilo.

4 - Forverŝu parton de la restinta oleo, varmigu la restintan, aldonu la
blankan sukeron kaj iom da akvo. Senhalte kirladu la miksaĵon kaj enpatigu
la frititajn batatojn, turnante ilin, por ke la likvigita sukero kovru la
batatpecojn. Ĉe la fino, delikate turnante la batatojn, surŝutu la nigran
sezamon sur ilin kaj elpatigu. Manĝu, kiam ili estas varmaj, kvankam
malvarmaj akaŭ estas bongustaj.

Mi spertis, ke preparado de tiu ĉi ĉina specialaĵo estas bona metodo,
por agrablighi aŭtunajn, grizajn tagojn.



Forpasis

La 13-an de oktobro 2021 en Olsztyn forpasis mia edzo, aktiva Esperanto-
aganto kaj iama prezidanto de PEA-Filio en Olsztyn, **Andrzej Gielert**.

La entombigo okazis la 20-an de oktobro sur la tombejo *Komunalny*
ĉe la str. Poprzeczna en Olsztyn.

Kun granda malĝojo, la edzino Brygida Gielert

*Bona memoro,
pli valoras ol oro*



*Bono farita ne
estos perdita*

L.L.Z. Proverbaro Esperanta

Andrzej Sochacki

12-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo 10-11.12.1994.

Espeantaj Tagoj de Krakovo organizis la loka Esperanto-klubo kunlabore kun la Krakova Kulturdomo "Podgórze". En la aranĝo partoprenis pli ol 50 personoj. Dum la renkontiĝo okazis prelegoj, koncertoj kaj urbovizitado. Stanisław Świstak prelegis pri "La libro kiel kultura fenomeno", gasto el Hungario d-ro I. Gether prelegis pri "Movado en Orient-Eŭropaj Landoj".

Okazis ankaŭ renkontiĝoj kun Maria Majerczak kaj Antoni Golonka.

Okaze de la 60 naskiĝfesto de Antoni Golonka, poetino Lidia Ligeza prezentis sian verkon "Antono Zamenhofido Golonka" kaj ankaŭ novajn poemoj.

Koncertis la koruso "Kamea" kaj kantis Jadwiga Dziegielewska.



Prelegas Antoni Golonka



E-Tagoj de Krakovo 1994 ,Foto: Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki rakontas pri planota Pola Esperanto Kongreso en Staszow



E-Tagoj de Krakovo 1994 ,Foto: Andrzej Sochacki

Maria Majerczak el Kraków



E-Tagoj de Krakovo 1994 ,Foto: Andrzej Sochacki


Prelegas d-ro I. Gether el Hungario



E-Tagoj de Krakovo 1994 ,Foto: Andrzej Sochacki

Adam Wilkus

Krucenigmo pri bestoj



E	C	A	F	E	G	B	I	B	C	H	E	G	A	J
1	2	3	2	4	5	5	1	4	6	3	2	1	2	4

,

D	B	I	J	D	C	I	A	H	F	H
1	2	5	3	2	3	2	1	2	3	5

.

A. Kvarpieda mamulo, kies anatomio permesas al la besto rapidigi por fuĝi de eblaj predantoj. Ĝi havas bone disvolviĝintan senton de ekvilibro kaj fortan fuĝ-luktan reagon kaj kapablas dormi kaj stare kaj kuŝe. Kiel adaptaĵo de ties membroj al kurado la nombro de fingroj estas malpliigita al ununura ĉirkaŭita de osteca materialo nomita hufo, adaptita al malfortigo de frapoj. Homoj uzas tiun beston por transporto kaj sporto, por distro kaj vetkuro, kaj ankaŭ por terapio. La besto moviĝas laŭ diversaj rapidoj kaj taktoj. Rajdantoj distingas jenajn irmanierojn de la besto: paŝado, troto kaj galopo.

B. La sudafrika ekvo, simila al azeno, sed kun pli longaj oreloj. Ĝi havas blankajn striojn sur malhela felo. Danke al tiuj strioj, la kurantaj bestoj estas malfacile videblaj por predantoj (ekzemple leonoj) do ĝi funkcias kiel protekta mekanismo. Pro simileco al tiu besto, oni tiel nomas la pasejon por piedirantoj trans strato.

C. Granda, dikhaŭta, senhara, sovaĝa mamulo kun unu aŭ du (depende de specio) longa(j) korno(j) sur muzelo, malgrandaj oreloj kaj okuloj, vivanta en Afriko kaj ankaŭ en Azio. Ĝi havas bonegan flarsenton kaj senteman aŭdon, sed tre malbonan vidkapablon. Ĉi tiu besto aktivigas ĉefe nokte kaj pasigas la plej grandan parton de la tago kaŝita en la ombro, proksime al akvo aŭ mergante en koto, por ne varmigi la korpon.

D. Relative malgranda felisedo, karnomanĝulo el la kato-familio. Ĝia hararo estas ruĝgriza, ĝis flavgriza, kun malhelaj strioj kaj makuloj. Ĉe ĉiu orelopinto ĝi havas hartufon. Ĝia vosto estas mallonga, kvazaŭ hakita, kun nigra fino. Predon ĝi atakas saltante de sur arbo.

E. Membro de unu el kelkdek specioj de malgrandaj kanisedoj, apartenas al la sama familio, al kiu apartenas, interalie, lupo. Ĝi havas plej parte ruĝkoloran felon kun blanka ventro, brusto kaj gorĝo. Ekzistas ankaŭ specioj arĝentkolora kaj tute blanka. Tiu besto havas pintajn orelojn kaj belan, longan voston. Ĝi estas tre inteligenta kaj ofte simbolas ruzon en fabeloj. Hispana nomo de la besto "zorro" estas uzita por nomi ĉefrolulon en romano pri sagaca venĝanto de malriĉuloj, kio spegulas karakteron de la besto.

F. Malgranda rongulo, ofte manĝata de rabobirdoj, ekzemple agloj, akcipitroj, strigoj kaj ankaŭ de aliaj predantoj, ekzemple katoj kaj serpentoj. Ĝi invadas domojn por nutraĵo kaj porokaze por ŝirmo. Unuavice nokta besto, kiu kompensas sian malbonan vidsensan per bona aŭdosenso, kaj fidas al la flarsenso, por trovi nutraĵon kaj eviti predantojn.



G. Malgranda mamulo, vivas sur arboj, havas longan, lanugan voston kaj hartufojn ĉe la oreloj, kutime rustkoloraj. Felo ĝia estas mallonga, delikata. Hararo, plejparte, estas ruĝbruna ĝis nigrabruna, ventro kaj brusto blanka. Ĝi moviĝas saltante. Ĝia manĝo konsistas ĉefe el semoj, interalie, el strobiloj, pinaj ŝosoj, glanoj, nuksoj, arboburĝonoj, fungoj, fruktoj, insektoj, ovoĵ kaj idoj de birdoj.

H. Surtere aŭ enakve vivanta reptilio, ĝian korpon kovras korneca kaj osteca kiraso, en kiun la besto povas entiri la kapon, voston kaj membrojn. Ĝi metas ovojn, el kiuj naskiĝas idoj. La besto estas longviva kaj moviĝas malrapide. Ĝi simbolas fiksecon, persiston en serĉado de celoj kaj konsekvencon en agoj.

I. Felisedo, vivanta ĉefe en Afriko, kiu povas atingi tre grandan kur-rapidon, ekzemple dum ĉasado. Ĝi estas la plej rapida tera besto atinganta rapidon de 93 km/h. La felo de la besto estas linkolora (kun flavaj kaj brunaj aldonajoj) kun rondaj, nigraj makuloj kaj nigraj linioj sur la flankoj de ĝia buŝo.

J. Hejmigita mamulo el la familio de kanisedoj. Ĝi havas fortajn muskolojn, efikan kardiovaskulan sistemon, kiu permesas atingi altan rapidecon kaj grandan reziston, kaj dentojn efikajn por reteni kaj disŝiri ĉasitajn predojn. La sensoj de flaro kaj aŭdo de tiu besto estas pli bonaj ol tiuj de homoj. Onidire ĝi estas la plej bona amiko de homo.

Zamenhof/Esperanto-Objekto

Robert Kamiński

Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 5

Ekde la apero de la internacia lingvo Esperanto, pasis 133 jaroj. Jam dum la vivo de ĝia kreinto, esperantistoj en la tuta mondo honoris lin, nomigante stratojn per la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kaj post la morto de la Majstro aperas en la tuta mondo tiaj monumentoj, placoj, parkoj, memortabuloj, ŝipoj, kaj eĉ astroidoj. La kreskanta Esperanto-movado sammaniere honoras ankaŭ aliajn aktivajn membrojn.

Ankaŭ en Pollando - patrujo de Esperanto, ekde la jaro 1919, aperas diversaj objektoj kun nomoj kunligitaj kun L. Zamenhof kaj E-movado. La impona nombro de ili konstante kreskas. La sube prezentita listo montras ĉiujn, ĝis nun registritajn, tiuspecajn objektojn en Pollando. Mi volas prezenti la polan ZEO-liston en la sekvaj ses numeroj de „Pola Esperantisto“.

Mian registradon de ZEO en Pollando mi komencis en la jaro 1996. Registradon de ZEO-j en la mondo komencis *Hugo Röllinger*, per la libro

„Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj, en 54 landoj”, kiun eldonis UEA en 1997. Ekde tiu jaro mi serĉas kaj registras ĉiujn objektojn, dediĉitajn al nia majstro kaj Esperanto-movado.

Ni kune kompletigu kaj korektu la liston. Se vi trovos novan, ne registritan ZEO-n, aŭ se vi havas pli detalajn informojn pri ĝi, bonvolu kontakti min. Jen mia retadreso: rk-lodzo@wp.pl. Vi ankaŭ povas viziti la fejsbukan retpaĝon pri ZEO: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539>.

Ĉu vi memoras kaj zorgas pri ZEO en via ĉirakŭaĵo? Kontrolu, ĉu ĝi ekzistas. Purigu la tabulon, metu florojn ĉe la monumento (eĉ artefaritajn). Montru, ke ekzistas homoj, por kiuj ĉiu ZEO estas grava.

N-ro	Situo	Objekto	Ekzistas de la jaro
172.	Sosnowiec, kvartalo „Rudna”	Zamenhof-strato	1960
173.	Starogard Gdański, kvartalo „Łapieszewo”	Zamenhof-strato	12.11.1991
174.	Starogard Gdański	E-Arbo - Kverko – Esperanto kun Esperantlingva tabulo sur ŝtono	09.10.1999
175.	Szczawin apud Łódź, tombejo	Esperantlingva surskribo sur simbola tombo de Włodzimierz Pfeiffer	2010
176.	Szczawno Zdrój, parko „Szwedzki”	tabulo al Zamenhof sur ŝtono	1968
177.	Szczawno Zdrój, sur muro de mineralakva sanigejo, str. H. Sienkiewicza 1	Nomo de Ludoviko Zamenhof sur tabulo kun famaj kuracistoj	?
178.	Szczawno Zdrój, str. Spacerowa 1	Tabulo sur vilao „Franciszek” kie ripozis Ludwik Zamenhof	04.08.2012
179.	Szczecin, kvartalo Centrum	Zamenhof-placo	09.02.1960
180.	Szczecin, str. Monte Cassino 13/14	Ŝtono kun metala tabuleto kun surskribo “Esperanto 1887-1987”	1987
181.	Śrem, kv. “Jeziorany”	Zamenhof-strato	?
182.	Święta Woda – Wasilków, apud Bjalistoko	E-kruco. Ligna kruco kun metala tabuleto kun esperantlingva teksto	29.05.2010
183.	Świdnica,	Esperantistoj-strato	?
184.	Świdnica,	Esperanto-Bushaltejo	?
185.	Swidnica, str. Stęczyńskiego 18	Hotelo „Esperanto”	11.2009
186.	Świdnica	Zamenhof-strato	1960
187.	Tarnów, kvartalo „Zabłocie”	Zamenhof-strato	1986
188.	Tarnów, kvartalo „Zabłocie”	Esperantistoj-strato	1986
189.	Tomaszów Mazowiecki	Zamenhof-strato	1984
190.	Toruń, kv. „Koniuchy”	Zamenhof-strato	1959
191.	Toruń, en la Liceo nr 1, str. Zaulek Prosimy 1	Tabulo al Antoni Grabowski	24.10.1998 9.30

192.	Toruń, kv. „Koniuchy”	Antoni Grabowski-strato	1959
193.	Tykocin, str. Piłsudskiego 25	Tabulo al Marko Zamenhof	1999
194.	Unieście	Esperanto-strato	1976
195.	Wałbrzych, kv. „Piaskowa Góra”	Zamenhof-placo	?
196.	Wałbrzych, sur Z-Placo	Zamenhof-monumento - ŝtonego kun bronza tabulo	1988
197.	Warszawa, kvartalo Muranów	Zamenhof-strato	24.02.1931
198.	Warszawa, str. Zamenhofs 5	Tabulo pri Zamenhof (loko de loĝdomo de L. Zamenhof)	1959
199.	Warszawa, kvartalo Muranów	Esperanto-strato	1960
200.	Warszawa, str. Anielewicz, kvartalo Muranów	Fina bushaltejo “Esperanto”	?
201.	Warszawa str. Nowolipki	Du bushaltejoj „Zamenhofs” (Zamenhof str.) en du vojaĝdirektoj	?
202.	Warszawa, kvartalo „Suda Urbocentro”, str. Hoża 42	Tabulo al Antoni Grabowski	6.6.1933, 1988
203.	Warszawa, Fakultato de Kemio en Varsovia Universitato, str. Pasteura 1,	Tabulo al Antoni Grabowski (apud la salono 141)	1995
204.	Warszawa, kv. „Suda Urbocentro”	Antoni Grabowski-strato	?
205.	Warszawa, kv. Muranów tombejo Stare Powązki	Familia tombo de Antoni Grabowski kun inf. pri Esperanto	1921
206.	Warszawa, juda tombejo str. Okopowa 49/51, kv. Muranów	Tomboŝtono de L. Zamenhof kun epitafo	1926
207.	Warszawa, juda tombejo, str. Okopowa 49/51	Tombo de Klara Zamenhof kaj simbola tombo de Lidia kaj Zofia Zamenhof	06.12.1924
208.	Warszawa, juda tombejo, str. Okopowa 49/51	Esperantlingva tabulo sur tombo de Aleksander Silbernik	09.05.2010 (renovigo de la tombo)
209.	Warszawa, juda tombejo, str. Okopowa	Tombo de Zofia Banet – Fornal kun esperantlingva surskribo	19.11.2012
210.	Warszawa, katolika preĝejo, str. Conrada 7	Esperanto-vitralo	19.10.2002
211.	Warszawa, kv. „Muranów”	Esperanto-murpentraĵo	12.2011





Varsoviaj ZEO-j

- Zamenhof-strato
- Murpentraĵo en kvartalo Muranów
- Esperanto-vitralo
- Bushaltejo Esperanto
- Grabowski-strato
- Memortabulo al Antoni Grabowski en Fakultato de Kemo



„Foiro de Bono” en Poznań kun esperantistoj



Dom Spotkań z Historią

Przemysław Wierzbowski kaj Paweł Średziński interparolas pri Esperanto en YouTube-programo „Bliki nam świat” (Mondo proksima al ni)



Partoprenantoj de Esperanto sur Strando 2021 apud Esperanto-monumento kaj kverko Esperanto en Sopot



NIA FOTOGALERIO



Organizantoj de la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kun dancgrupo *Gracie*



Partoprenantoj de 45-aj Esperantaj Preĝtagoj en Częstochowa 8-10.10.2021